Our fear-ridden world desperately needs general good-will. Nothing aids in the development of good-will more surely than personal contacts with friendly folks of other lands. Hence, as the President of the American Association for the Advancement of Science declared in 1946: ". . . we emphasize persistent friendship and tolerance, more correspondence across borders, more travel across the boundaries of nations, more collaboration across the national political lines, until finally the boundaries become worn dim by so much intellectual traffic."

How can colleges promote quickly and in a truly large way, such aids to international understanding? Modern language study often helps, but it produces annually only a few thousands able to use one foreign speech for correspondence and travel, and the world's need is for millions who know and have friendly contacts with the peoples of many lands. It is fortunate, therefore, that a good and adequate bridge across the gulf of speech-differences is right at hand, the interlanguage Esperanto.

WHAT IS ESPERANTO? It is the international auxiliary language, designed to supplement, not to replace, national tongues. Its vocabulary is based chiefly on the Romance languages; American college students recognize at sight some two-thirds of its root words. Its grammar is simple and consistent; its spelling is phonetic; it includes the best features of many idioms. Gilbert Murray, the English philologist wrote: "Esperanto is a delicate and beautiful piece of work." The following is a sample of Esperanto:

Inteligenta persono lernas la interlingvon Esperanto, rapide kaj facile. Esperanto estas la moderna, kultura lingvo de la internacia mondo. La praktika solvo de la problemo de interkompreno, lingvo simpla kaj fleksebla, Esperanto meritas vian seriozan konsideron.

Since the Polish scholar, Dr. L. L. Zamenhof, first published Esperanto in 1887, the language has been tested in use by hundreds of thousands of persons. In correspondence, travel and international conventions it has been found adequate for every need—commercial, cultural and scientific. It has a literature of several thousand volumes—original works and translations of famous classics. Some fifty magazines are published regularly in and about Esperanto. World-wide Esperanto Leagues of groups as diverse as scientists, physicians, teachers, police, postal workers, Boy Scouts, Catholics and Quakers, are reviving from the blight of fascism. In nearly two thousand places, all over the globe, in some eighty nations and dependencies, the International Esperanto League has delegates, each one pledged to aid fellow interlinguists in search of information. Today Esperanto is a living, growing language.

WHY PUT ESPERANTO IN THE COLLEGE CURRICULUM? Because Esperanto is easy to learn, the student can quickly begin to get international contacts through magazines, meeting visiting interlinguists, correspondence and travel. Esperanto can be learned in from 15 to 25 per cent of the time needed to acquire a national idiom.

Persons who plan to learn a foreign language find Esperanto an ideal introduction. Study of its logical organization helps one understand grammar, and serves as an excellent preliminary to the grammar of other idioms. The international vocabulary gives a good start to the future student of French,

Spanish, Portuguese or Latin. Its simplicity and consistency attract to further language study.

For students who learn no national language but their own, Esperanto provides a gate from provincialism to world interest.

The college that gives the leaders of tomorrow instruction in Esperanto provides them with a means of saving time and avoiding misunderstanding in international trade, exchange of scientific data, diplomacy, and the work of all international organizations. Projects of the United Nations will be clarified and accelerated when delegates and officials can use one interlanguage, in place of the present two working and five official languages.

HOW CAN A COLLEGE BEGIN? Any willing college can easily arrange to give an adequate course in Esperanto. Textbooks and excellent helps for teaching by the direct method are available. Of course it is best for prospective teachers to be instructed by well qualified Esperantists, but acceptable elementary courses have been given by linguists who learned from books only. Successful instructors are sometimes not professional linguists, but teachers of other subjects who like languages and want to serve the cause of peace. You yourself may well become a good Esperanto teacher.

From our own study and practical use—in reading, correspondence and travel—we know the value of Esperanto. Therefore we, present or former educators in American colleges, urgently recommend to colleges the teaching of the interlanguage for a united world. Inviting inquiry, we offer you our individual counsel and the services of our general organization, the *Esperanto Association of North America*, 114 West 16th Street, New York 11, N. Y.

ARCHIE J. BAHM, Ph.D.

Associate Professor of Philosophy, University of Denver

F. J. BELINFANTE, Ph.D.

Associate Professor of Physics, University of British Columbia

ELVEN J. BENGOUGH, A.B., C.S.R.

Registrar, McMaster University

DUDLEY C. BROOKS, A.M.

Assistant Professor of English and Journalism, Univ. of Wis.

G. EWART BROWN, A.M.

Instructor in Mathematics, Institute of Technology, Calgary

RAYMOND T. BYE, Ph.D.

Professor of Economics, University of Pennsylvania

EDWIN L. CLARKE, Ph.D.

Professor of Sociology, Rollins College

J. M. CLIFFORD, A.B.

Extension Secretary, Oregon State College

ERNEST G. DODGE, A.M.

Sometime Asst. Professor of Greek and Math., Berea College

ROYAL W. FRANCE, A.M., LL.D.

Professor of Economics, Rollins College

ERICH FUNKE, Ph.D.

Professor of German, State University of Iowa

FRANK M. GRACEY, Ph.D.

Professor of Psychology, State Teachers College, Castleton, Vt.

EUGENIE MARIE YVONNE GRAND, A.B.

Assistant Professor of French, Rollins College

GORDON W. HEWES, Ph.D.

Asst. Professor of Sociology and Anthropology, Univ. of N. Dak.

- MARGARET KIDDER, Ph.D.
Assistant Professor of Spanish, Drury College
- WILLIAM J. H. KNAPPE
Sometime Professor of Philosophy, Wartburg College
- C. L. MAEDER, Ph.D.
Professor Emeritus of General Linguistics, Univ. of Michigan
- NORMAN A. MCQUOWN, Ph.D.
Assistant Professor of Anthropology, University of Chicago
- JULIA MATTSON, A.B.
Instructor of Ceramics, University of North Dakota
- PARRY MOON, S.B., S.M.
Associate Professor of Electrical Engineering, Massachusetts Institute of Technology
- WELDON T. MYERS, Ph.D.
Professor of English, Converse College
- MARIE LOUISE MYNSTER, A.M.
Instructor of English, University of North Dakota
- PAUL NEERGAARD, M.S., Dr.Agro.
Resident Doctor, Cornell University; Director of Phytopathological Laboratory, J. E. Ohlsens Enke, Copenhagen
- FRANCIS S. ONDERDONK, Ph.D.
Sometime Instructor of Architecture, University of Michigan
- MARIO A. PEI, Ph.D.
Associate Professor of Modern Languages, Columbia University
- ARNOLD PENNEKAMP, A.M.
Professor of English, Immanuel Lutheran College
- WILLIAM PICKENS, A.M., Litt.D., LL.D.
Sometime Dean and Vice President, Morgan College
- D. W. PITTMAN, M.S.
Professor of Agronomy, Utah Agricultural College
- MICHAEL J. PLESE, D.D.S.
Sometime Associate Professor of Prosthetics, College of Dental and Oral Surgery, Columbia University
- JAMES C. SANDERSON, Ph.D.
Assistant Professor of Mathematics, Institute of Technology, University of Minnesota
- STEWART M. SCHRACK, M.Ed.
Assistant Professor of Psychology, Westminster College
- ISABEL P. SNELGROVE, A.M.
Instructor of Art, University of North Dakota
- JOSEPH TAMBORRA, A.M.
Associate Professor of Modern Languages, Univ. of N. Dak.
- EUGENE H. THOMPSON, A.M.
Instructor in French and Spanish, University of Kansas City
- FRANK TOMICH, A.M.
Professor of Modern Languages, Fenn College
- JENNIE M. TURNER, Ph.D.
Visiting Professor of Economics, University of Puerto Rico
- L. A. WARE, Ph.D.
Associate Professor of Electrical Engineering, State Univ. of Iowa
- LEHMAN WENDELL, D.D.S.
Sometime Professor of Prosthetic Dentistry, College of Dentistry, University of Minnesota

May, 1947

We invite further signatures from present and former college teachers who wish to add their support to this endeavor.

December 2, 1946

C I R C U L A R
regarding the teaching of the
World Auxiliary Language Esperanto

To the Inspectors General of Elementary Schools and High Schools
To the Presidents of Teachers' Colleges
To the Directors of the Experimental Schools of the Universities of Athens
and Saloniki, and
To all High School Principals.

Considering the increasing importance which the world auxiliary language Esperanto is acquiring in the civilized world, and calling to your attention former circulars on the teaching of the world auxiliary language Esperanto to the students of High Schools and State Teachers' Colleges, issued under No. 55,517 on October 28, 1929, under No. 65,896 on November 7, 1931, under No. 59,433 on October 28, 1932, under No. 94,066 on October 9, 1939, and under No. 71,639 on August 24, 1946, we hereby instruct you to facilitate in every way such teaching, which is given, without remuneration from the public budget, by professors holding diplomas of the Superior Greek Esperanto Institute of Athens.

It is opportune that the Presidents, Directors and Principals of the above-mentioned schools and colleges, before the beginning of an Esperanto class, explain to their students the great significance and value which this language has attained in modern civilization and that they recommend to their students, on this occasion, that they attend classes with regularity, devotion and interest.

We also recommend that the Presidents, Directors and Principals read regularly the bi-monthly journal, "Helena Esperantisto", the official organ of the Greek Esperantists.

The Minister of Religious Affairs and National Education
(Signed) A. PAPADIMOS

The International Office "Esperanto in the Schools", Amsterdam, Holland, has resumed its activities under the direction of Mr. P. W. Baas.

The Swedish Minister of State told the President and the Secretary of the Swedish Esperanto Institute that he favors the idea of organizing Esperanto courses for teachers at Government expense because he "wishes to support all cultural relations among the nations".

The French Ministry of Education has undertaken to pay the travel expenses of 45 teachers scheduled to attend an Esperanto Summer School to be held at the Chateau de Belmont, August-September 1947.

In the United States Esperanto is being taught at an increasing number of schools and colleges. An incomplete survey of these was given in the November-December 1946 issue of the "American Esperantist" (p. 130).

"I AM WILLING TO DO A FULL PART . . ."

With these words, *A. S. Mellichamp*, responded to Dan Ward Gibson's appeal for a *Sustaining Plan* for the Central Office. It was S-ro Mellichamp who, some months ago, wrote that he would provide one month's salary for the Secretary, if eleven others would pledge to do likewise. With sincere and heartfelt appreciation to S-ro Mellichamp (and other members who have suggested that we ought to have a paid General Secretary), we feel that the immediate and pressing need is for a *paid full-time office worker* to assist your Secretaries.

Every phase of the work for Esperanto at the Central Office, has grown tremendously. Requests for information, lectures, articles, research, etc. Also a great increase in foreign contacts and correspondence. Then, too, the membership is now three times what it was when we established the office in New York. We are rapidly approaching the point where your Secretaries must devote all their time and talent to correspondence only. All this, coupled with sky-rocketing printing costs (and costs in general) demands immediate solution.

The happy side of this picture is, of course, the growing interest in Esperanto on the part of important people, organizations, and the public generally. Dan Ward Gibson's appeal is not one to save a sinking schooner, but instead is one to *equip and staff* a modern ocean liner that can 'go places' for *Esperanto in America*. Time was, when we thought it sufficient to *service a small samideanaro* through a single part-time Secretary. Now, in the post-war world, there is an insistent demand *that we promote Esperanto* — in the schools, in tourism, in business, in radio, and every other

practical field of human endeavor. As President Clarke says: "Victory is when we take it!"

The world looks to America for leadership; — why not leadership in Esperanto? *Esperanto in America* will mean Esperanto triumphant throughout the world. It is up to *all* of us to sacrifice, *to the utmost*, for a strong Central Office and an effective organization.

We look forward to a time when the talents of your Central Office Staff may be devoted to important promotion tasks — when a paid office-worker can "hold the fort" effectively, while your Secretary attends an Esperanto Congress, or takes a day off to speak before some important organization. (We cannot forget the terrific mass of detail and correspondence which awaited our return from last year's Congress at Conway!)

We feel sure that a large number of members will respond to President Clarke's appeal. President Clarke, himself, has joined the \$10-a-month plan — in addition to his many other sacrifices for Zamenhof Fund, etc. Dan Ward Gibson, "Anonymous", Dr. Luel-la K. Beecher, A. S. Mellichamp, Mrs. Flora Wyman, Washington Esperanto Club, have added their "votes". John W. Clewe sends \$5 per month, although on pension; and John W. Wood of Zenith, Washington, sends \$1 per month. Samideano Wood's dollar is a real and generous sacrifice considering his circumstances — we intend to print something about his loyal life-time assistance to Esperanto, in a forthcoming issue of AE. There are others who are contributing. We now have almost half enough to pay for a competent office-worker. Surely every member will want to join in this crusade.

The Esperanto Association of North America

EXECUTIVE COMMITTEE

Edwin L. Clarke, *President*

G. Alan Connor, *Gen. Sec'y*,

Joseph Leahy, *Member*

VOLUNTEERS FOR VICTORY

With a monthly income of one thousand dollars, EANA can have a full time paid secretary, all the printed matter we can use, and money for advertising. We can have these things, and more, without a burden on any one of us, if we all make just a little effort. Perhaps we can't afford ten dollars per month for the Sustaining Fund. All right, we can still help and not suffer.

Here's the way. Let everyone of us, for whom ten dollars per month is too much, pledge instead one half of what we spend for sheer luxury: cokes, candy, movies, smokes, cocktails, costume jewelry, football games and we know what else. Such a pledge will not cost us one red cent, if we cut down on these luxuries by one third, and contribute what we save. It will be an economy, indeed, for we can deduct from the income taxes what we give to EANA, and we can't do that with pleasure expenditures.

If we spend little for pleasure, we shall give little. If we spend much we can afford to give more *ĉu ne?* If on second thought we prefer to give ten dollars per month in lieu of the percentage on luxury spending, EANA will gladly accept and will recognize us as loyal supporters.

If just one hundred Esperantists will join in this project, we can grasp victory in America. If two hundred will sign up as Volunteers for Victory, we can have a triumphal march. Esperanto or elegance! Lingvo kara or luxury! Let those who love *la afero* with their hearts, and not with lips only, fall in line. A check is a vote. Victory is when we take it! I have confidence that we shall not fail Esperanto.

—EDWIN L. CLARKE, *President, EANA*

"Mi legis la leteron de S-ro Gibson pri helpo al A. E. Pro tio mi sendas mian bankĉekon por helpi la movadon." (\$100.00) — *Anonymous*.

"I subscribe heartily to Mr. Gibson's suggestion in his article in our last A. E. to our making regular monthly contributions to the Esperanto Cause — for this is really the "year of decision" and *now is the time*. I am therefore enclosing herewith a check of thirty dollars to cover January, February and March." — *Luella K. Beecher, M. D.*

"I too think it is *high time* that something be done, and deplore the fact that, as S-ro Gibson says, 'we have allowed this situation to develop'. . . so why not do something financially about Esperanto that will be worth while? I am willing to do a full part, and this is a starter as still more respond.' (\$10 per month) — *Albert St.Lo Mellichamp*.

"Mrs. Clewe and I have just read Dan Ward Gibson's proposal and, while we, as pensioners, don't dare to undertake the \$10 a month contribution to the sustaining fund, we hereby pledge ourselves to half the amount monthly. Check for March and April enclosed. We have the greatest admiration for your spirit and accomplishment, and feel that no one could better deserve a full complement of office staff." — *John W. Clewe*

E.A.N.A. CONGRESS 1947, CONWAY, NEW HAMPSHIRE

The E.A.N.A. Congress, 1947, will be held at Conway, New Hampshire,—*Lloyd Lodge, World Fellowship Center*. The Executive Committee decided to return this year, to the "Forest-Farm-Lake-and-Mountain Paradise". *Time*: July 4, 5, 6 (with arrivals planned for the get-acquainted evening July 3.) In addition, a possible "refresher course" in Esperanto may be started on June 30, to continue through the week—this will be decided shortly. Reservations for the Congress may be made *now*, with date of your arrival decided later if you wish. *Reservations*: Must be made at earliest convenience, accompanied with deposit of \$3.00 to hold choice. *Congress Ticket*: The customary \$3.00, for both participants at Conway, and participants-by-mail. Send in your \$3.00 for Congress Membership. Ask for the new folder of *World Fellowship*, which illustrates and describes the Center and surroundings. One picture is a group photograph of last year's Esperanto Congress, taken in front of Lloyd Lodge.

Despite rising prices, Chas. F. Weller, President of World Fellowship, has agreed to about the same prices as last year. That will be \$4.50 per day, except for a very few more comfortable and private rooms at \$5.00. Other rooms at Cottage, Farm House, and big comfortable army tents, will be something less than \$4.50. All details will be printed and sent out later — but get your Congress ticket *now!*

SPECIAL CONTRIBUTIONS TO EANA: We sincerely appreciate the following contributions to EANA, received since January 1st — *Francis Sumner* \$20, *Joseph Girard* \$8, *Clement Ayres* \$2.50, *Martin Winant* \$1.50, *Geo. Dickau* \$1, *Julia May Leach* \$1, *Richard Earnhart* 40c.

PUBLICITY FUND: The following contributions greatly aided in making a success of the \$1000 Fund (these contributions have not previously been reported in AE): *Dr. G. P. Ferree* \$100, *Dan Ward Gibson* \$25, *Peoria Esperanto Association* \$25, *Robt. Karlson* \$12.10, *Wm. H. Gix* \$9.45, *Prof. Edwin L. Clarke* \$6, *Former Publicity Committee* (Cora L. Fellows, Chairman) \$5.56, *Grace Randolph* \$5, *W. S. Ryan* \$3, *Robt. Blackstone*, *J. J. Butler*, *Daisy Flanders Hopkins*, *Jack McCarthy*, *Prof. Joseph Tamborra* \$2 each, *Mrs. F. W. Fay*, *Elwyn Rhys* \$1 each, *A. S. Vinzent* 50c.

ESPERANTO-KALENDARO: Beautifully printed 1947 Calendars, in dark green with green star, on white blotter 4 x 9 inches. Names of days and months in *Esperanto*. Also contains Esperanto pronunciation, compiled by John Bovit, LL.B. Excellent for classes, offices, and general Esperanto propaganda. *Order in hundred lots*. While they last, we will sell them at less than production cost: 200 for \$2.00; 100 for \$1.50; 50 for \$1.00; 1 dozen for 50c; all sent postpaid. Let's show John Bovit that we appreciate his Esperanto-Kalendaro, and his contribution to *American Esperantist*.

INTERNATIONAL ESPERANTO LEAGUE: Memberships for 1947 as follows — MJ (Member with Yearbook) \$1.00; MA (Member-Subscriber) \$2.50. Send your memberships, subscriptions, etc., to *Esperanto Association of North America*, 114 West 16 St., New York 11, N. Y.

LA PRAKTIKO, organ of the *Internacia Esperanto-Instituto* and *Universala Ligo*, can not be printed during 1947 due to printing difficulties. Members will receive *Heroldo* as the organ of *Universala Ligo* during 1947.

VORTOJ DE NOVNASKITO

W. SOLZBACHER

Observi la naskiĝon de 350 novaj amerikanoj estas impresa sperto, precipe se la observanto estas unu el ili. La pasintan 27an de Januaro granda aro da personoj eniris la salonegon de tribunalo en New York kiel ŝtatanoj de multaj respublikoj kaj reĝolandoj aŭ kiel senŝtatanoj. Kelkajn horojn poste ili eliris kiel civitanoj de la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko, fariĝinte samnacionoj de 141 milionoj da homoj, kiuj kunlaboradas por libereco, demokrata progreso kaj ĝenerala bonfarto en unu el la plej grandaj kaj belaj landoj de la mondo.

Ricevinte la ĵuron de fideleco al la Konstitucio de Usono, "kun la helpo de Dio", la juĝisto faris paroladon, nomante nin "samnacionoj de Usono" (Fellow Americans). La nomoj, kiujn la sekretario legis, estis italaj, ĉinaj, hispanaj, irlandaj, judaj, germanaj, francaj, rusaj, arabaj, anglaj, svedaj, litovaj. La haŭtkoloro de la ĉeestantoj estis blanka, nigra, ĉokoladkolora, flava. Sendube ili apartenis al la plej diversaj rasaj, religiaj kaj kulturaj grupoj kaj havis pli ol 30 malsamajn gepatrajn lingvojn. Veninte el ĉiuj regionoj de la mondo, ili nun estas plenrajtaj civitanoj de tiu nacio, pri kiu la angla poeto *Percy Bysshe Shelley* kantis antaŭ 130 jaroj: (*)

Estas popolo juna kaj potenca
En lando trans la okcidenta maro.
Veron kaj liberecon ĝi adoras,
Kvankam per kruda rito, sen fanfaro.

Super la agonio de Eŭropo
Kreskadas daŭre via glora famo.
Miloj da forpelitoj alkuradas,
Servante vin kuraĝe kaj kun amo.

Kiel la sablo vi nun multobliĝu,
Granda popolo plena de fortiko!
Mateno venas, pasis for la nokto.
Vi supreniros glore, Ameriko!

(*La traduko estas libera kaj mallongigita.)

Dum la longa kaj iom teda atendado antaŭ la ceremonio mi pensis pri la vortoj, kiujn Prezidanto Woodrow Wilson parolis en famkonata parolado la 10an de Majo 1915:

"Usono estas la sola lando en la mondo, kie okazas daŭre kaj ĉiam denove tia renaskiĝo. Aliaj landoj fidas al la multobliĝo de siaj enloĝantoj. Nia lando ĉiam denove trinkas forton el novaj fontoj per la libervola aliĝo de grandaj nombroj da fortaj viroj kaj antaŭenrigardantaj virinoj el aliaj landoj. Tiel per libervola donaco de sendependaj homoj ĝi estas senĉese renovigata de generacio al generacio per la sama procedo, per kiu ĝi kreiĝis je la komenco. . . . Vi ĵus ĵuris lojalecon al la Unuigitaj Ŝtatoj. Lojalecon al kiu? Lojalecon al neniu persono, escepte Dio, — certe ne lojalecon al la personoj, kiuj por limigita tempo reprezentas ĉi tiun grandan respublikon! *Vi ĵuris lojalecon al granda idealo, al granda espero por la homa raso.* Vi diris al vi mem: Ni iras al Usono, ne nur por labore gajni niajn vivnecesaĵojn, ne nur por serĉi aĵojn, kiuj estis malpli facile akireblaj en la landoj, kie ni naskiĝis, sed por helpi en la antaŭenigo de la grandaj entreprenoj de la homa spirito. Ni iras, por montri al la homaro, ke ekzistas personoj pretaj vojaĝi trans fremdajn oceanojn en landon, kie oni parolas fremdan lingvon, se ili povas kontentigi la spiron de siaj spiritoj. Ili scias, ke *kia ajn estu la lingvo, la homa koro ĉiam havas la saman celon kaj deziron: ĝi volas liberecon kaj justecon.*"

"Vi portas ĉiujn landojn kun vi". Prezidanto Wilson diris, "sed vi venas kun la decido, lasi ĉiujn aliajn landojn malantaŭ vi, alportante ĉion, kio estas plej bona en ilia spirito, sed ne rigardante trans viajn ŝultrojn kaj ne klop-

dante reteni tion, kion vi decidis lasi malantaŭ vi. Mi neniel intencas konsili al iu, ke li ĉesu ami la hejmon, kie li naskiĝis, kaj la nacion de lia deveno—tiaj valoroj estas sanktaj kaj ne devas esti eligataj el niaj koroj—, sed estas unu afero, ami la lokon, kie vi naskiĝis, kaj estas alia afero, dediĉi vin al la lando, en kiun vi venis...”

“Se ni iel fariĝis malfortaj en nia idealo”, Prezidanto Wilson aldonis, “vi alportis iom de tiu idealo kun vi. Homo ne foriras en la mondon, se li ne serĉas ion, kio jam estas en li. Homo ne esperas ion, en kio li ne kredas. Se kelkaj el ni forgesis ion de tio, en kio Usono kredas, vi alportis al ni en viaj koroj renovigon de la kredo... Neniu homo, kiu ne vidas viziojn, iam realiĝos altan esperon aŭ laboros por alta afero. Ĉar vi alportis kun vi revojn. Usono estos pli kapabla realigi tiajn revojn... En tiu senco mi vidas en viaj koroj la vivantan realecon de la grandaj idealoj, kiuj faris Usonon la espero de la mondo.”

La parolado, kiun la juĝisto faris okaze de mia civitanigo, ne estis en same bela stilo kiel tiu de Prezidanto Wilson, sed ĝi esence esprimis la saman ideon. La juĝisto emfaze diris, ke nentiam en historio usona civitaneco havis tiel grandan signifon, kaj ke la fundamentaj ideoj de la Nordamerika Respubliko estas pli gravaj ol iam antaŭe.

La unua prelego, kiun mi faris kiel usona ŝtatano, estis en hebrea templo en Haverhill, Massachusetts, kaj mia temo estis “La Gvida Rolo de Usono en Ŝanĝiganta Mondo”. Analizante tiun temon, kiel katoliko parolanta al judaj samnacionoj, mi forte sentis la necesecon, esprimi la fundamentan fakton, ke Usono ne konstruiĝis sur komuna bazo de raso, lingvo, religio

aŭ kulturo, sed ke ĝi estas la sola granda nacio en la mondo, kiu konstruis sian propran personecon kaj sian konstitucion sur grandan ideon. Tiun ideon Thomas Jefferson formulis en la Deklaracio de Sendependeco antaŭ pli ol 170 jaroj: “*Ke ĉiuj homoj estas kreitaj egalaj, ke ili estas dotitaj de sia Kreinto per certaj neforigeblaj rajtoj; ke inter tiuj rajtoj estas vivo, libereco kaj celado al feliĉo; ke por la protekto de tiuj rajtoj registaroj estas starigitaj inter la homoj, ricevante siajn justajn povojn de la konsento de la regitoj; ke, kiam ajn iu formo de regado fariĝas detrua rilate al tiuj celoj, estas la rajto de la popolo ŝanĝi aŭ forigi ĝin...*”

Jen la principoj solene proklamitaj en la naskodokumento de nia Respubliko. En mia parolado en la sinagogo en Massachusetts mi diris, ke ni devas esti fieraj pri ili, sed samtempe humilaj, ĉar la realeco ne ĉie kaj ĉiam respondas al la idealo. Se ni parolas pri la gvida rolo de Usono en la mondo, mi diris, ni tiun vorton ne komprenas en la senco de imperialismo aŭ potencpolitiko, sed en la senco de morala gvidado kaj de agado por la ĝenerala akcepto de tiuj principoj.

Se enmigrintoj fariĝas usonaj civitanoj, ili forjuras lojalecon al fremdaj princoj, potenculoj aŭ registaroj. Por mi, kiel por multaj aliaj, tiu formulo ne havis multe da senco, ĉar depost longa tempo ni ne estis civitanoj de iu fremda lando, sed akceptis lojalecon nur al nia konscienco kaj al la bono de la homaro. Civitanigo en Usono feliĉe neniel signifas malpligrandiĝon de tiu lojaleco, ĉar akceptante civitanecon en ĝia plej profunda senco kaj laborante por la “neforigeblaj rajtoj”, pri kiuj parolas la Deklaracio de Sendependeco, oni agas samtempe kiel civitano de Usono kaj kiel civitano de la mondo.

MALGRANDA REVUO, altkvalita Esperanto-gazeto kun tre interesaj artikoloj, rakontoj, poemoj, eldonita en Svedujo de Stellan Engholm. Ĉiuj jarkolektoj: 1943, 44, 45, 46, entute 10 numeroj, por \$2.50.

MI VIDIS LA ATOM-BOMBON!

ILOW C. LIMB, AEM 3/c

U.S.S. Shangri-La, 25 Julio 1946:

"La liberigo de atoma energio stari-gas novan povon tro revolucian por konsideri en la kadro de malnovaj ideoj." — Prezidanto Harry S. Truman, en sia parolado al Kongreso, Oktobro, 1945.

Mi rememoris tiujn vortojn de nia Prezidanto de Usono, kiam mi komencis skribi pri la eksplodo de la kvara atoma bombo, kion mi ĵus antaŭnelonge vidis. Malnovaj manieroj priskribi senliman povon kaj spektaklajn okazojn ŝajnis esti tre nesufiĉaj por priskribi la senrivalan furiozon kaj grandecon de la eksplodo de atoma bombo, kion mi vidis matene la unuan de Julio, 1946.

La sento de solena timo pli intensiĝis pro la konstato ke nia ŝipo, la aeroplano-portŝipo "U.S.S. Shangri-La" estis pli ol 40 mejlojn for de la areo de bomb-eksplodo. Tamen la superega grandeco de la eksplodo kreis iluzion de proksimeco al ĝi. Ne nur mi speritis tiun senparalelan timon pri la eksplodego; ankaŭ ĝi respeguliĝis en la vizaĝoj de miaj kunŝipanoj, kiam ili rigardis la postsignon de la eksplodo—tiun radioagan nubon ŝvebanta rapide supren al la ĉielo.

Neniaj komentoj aŭdiĝis surŝipe tuj post la eksplodego, nur la spontaneaj ekkrioj de malkredo kaj miro. Ĉar ni estis rigardantaj spektaklon kiun nur malmultaj homoj jam vidis, kaj restis vivaj por tion priskribi. Ni vidis gigantan kolonon de kirlegantaj radio-agaj eroj etendiĝanta supren kvindek-mil futojn, havanta la aspekton de agariko farita el delikata ruĝeta kotono. Post kiam la nubo atingis sian plenan grandecon, ĝi retenis la aspekton de agariko dum proksimume kvin minutoj antaŭ ol la vento ĝin disŝiris.

Tiu bildo restis viva en mia memoro kiam venis la mateno de la dua Bikini-provo. Antaŭ la destinata tempo por

la eksplodo de la atoma bombo, ĉiuj ŝipanoj kunvenis sur la flugferdeko. La kunveniĝo signifis ke la "U.S.S. Shangri-La" finis sian rolon en la plano de agado: la forsendo de radiokontrolitaj aeroplanoj, kiuj traflugos tra la radio-aga nubo formita de la atombomba eksplodo.

La aero estis peza kun vibra anticipado dum Kapitano W. P. Cogswell donis la temp-signalojn kiuj antaŭis la difinita eksplodo-signalon de la atoma bombo: "Unu minuton pli, tridek sekundojn, atentu, dek-kvin sekundojn, dek sekundojn, kvin sekundojn, kvar, tri, du, unu!"

Fine, la terura anticipado disrompiĝis kiel bobelo; kaj anstataŭis ĝin intensa ekscito, dum ĉiuj okuloj rigardis la horizonton (kvardek-du mejlojn distance) — la horizonton kiu ŝajne ŝirigiĝis vertikale kun fulmo-rapido. Poste, senparalela volumeno da akvo en formo de giganta inversita konuso ŝprucis supren. La disfalo de tiu akvokolono (proksimume unu milionon da tunoj) kreis grandegajn disĵetitajn ondojn, kiuj ĉirkaŭis la areo de la bomb-eksplodo. Jen denove atoma nubo boliĝis supren, sed ĝi estis pli malalta kaj pli senforma ol je la unua provo.

Tiu atoma nubo, produktaĵo de la homa venko super nukleo-fendigo, baldaŭ estis kaŝita de ŝvebantaj kumulusaj nuboj, kaj ni ne plu povis vidi la dis-solviĝon de la atoma nubo. Dum kiam ĝi malaperis de nia vido, ĉu ni, la kunŝipanoj, plene komprenis pri la komplikaj problemoj kiujn la bombo estis kreanta por la homa raso? Mi opinias ke ni ne komprenis.

La homa menso ne estas kondiĉita por la inteligenta kompreno de la vasta energio liberigita per nukleo-fendigo. Ekzemple, sciencistoj demandas, kiel oni povas kompreni premegon kiu estas milbillionoble pli granda ol la atmosfera premo? Same ankaŭ, mi opinias,

la kompreno de la homo limiĝas, kiam li devas konjekti kiom multe la atoma epoko devas ŝanĝi la ekzistantan senfarecon pri internacia interkompreno.

Pensemaj homoj jam skribis pri la vojo, kiun la homaro devas sekvi se atoma energio pliriĉigus nian vivon anstataŭ detruĝi ĝin. Arthur H. Compton, gajninto de la Nobel-Premio en 1927, diris: "La mondvasta kreskado de scienco kaj teknologio estas la ĉefa vojo al rapido evoluo de la homo en socian estaĵon kies komunumo estas la tuta mondo." J. R. Oppenheimer de la Kalifornia Teknologia Instituto diris: "La vasta pligrandigita povo de detruado, kion atomarmiloj provizas, kunportis ŝanĝon en la balanco inter la nacia kaj la internacia interesoj. La komuna bono de ĉiuj ŝajne multe pli gravus ol iu nure nacia bono, ĉu de prospero aŭ de sekureco. Vera sekureco de ĉi tiu lando, kiel de iu ajn alia, troviĝos se troveble, en la kolektivaj penoj de ĉiuj."

La urĝeco kaj bezono de facila kompreno inter nacioj devas esti forta alvoko al Esperantistoj por etendi siajn propagandajn klopodojn por ke pli el iliaj samnacionoj lernu pri la neŭtrala interlingvo Esperanto.

Mi ne kredas ke Esperanto ludas supergravan rolon en la atingo de monduneco de penso kaj ago, sed tamen ĝi estas la plej forta lingvo-gluo kiun ni havas je nia dispono por gluigi kune naciajn ideojn en unu majstro-planon komprenebla de la tuta homaro. Ĉar Esperanto efektive estas stariganta vastan internacian frataron, oni povas kaj devas anticipi multon el tiu frataro, en la atingo de frateco inter popoloj ĉie.

Simile kiel la frapanta potenco kaj fina decido de la atoma bombo mem, mi kredas, ke nun estas la tempo kiam Esperantistoj ĉie devas pliintensigi siajn penojn por prezenti la avantaĝon de Esperanto al la popoloj de la mondo, kiel praktika ilo por atingi unuecon, komprenon kaj bonvolon.

JULIA ISBRUCKER PLANAS VIZITON AL AMERIKO

Julia Isbrucker, eble la plej sperta kaj plej lerta Esperantistino en la tuta mondo, sin pretigas por veni al Ameriko en Septembro, *ĉi tiun jaron!* Tio estas tre ĝojiga kaj grava novaĵo—kaj ĝi estas samtempe signalo por tuja pretigo niaflanke, por vaste kaj efike aranĝi kunvenojn por ŝi. Tio signifas ke ni oficiale kaj individue meti ŝin antaŭ kiel eble plej multe da altnivelaj organizoj ĉiuspecaj. Si ni ĉiuj kunlaboras en la klopodado, ni ja vidos mirindan progreson por Esperanto inter neesperantistaj rondoj. Estas eksterordinara bonŝanco por ni.

S-ino Isbrucker, gvidantino de la Internacia Esperanto-Instituto kaj de la Universala Ligo, Hago, Nederlando, jam ricevis vizon, kaj venos kun *Esperanto-filmoj!* *Andreo Cseh* aldonis la Esperanto-paroladojn al la filmoj. Ili

temas pri la "*Rekonstruo de Nederlando*" (Insulo Walcheren, Batalo ĉe Arnhem, Zuiderzee, Belaj Pejzaĝoj inter Nekredebla Detruo, ktp.) S-ino Isbrucker ankaŭ estas preta por paroladi pri Esperanto, Cseh-Metodo kaj la Instituto, mondfederacio, aŭ Universala Ligo. Ŝi jam ricevis invitojn de Soroptimistaj Kluboj, kaj diversaj aliaj altnivelaj organizoj. Sed, ni devas helpi pri kolegioj, Rotario-kluboj, forumoj, lernejoj, ktp. Ni devas esti pretaj por granda Aŭtuna sezono.

S-ino Isbrucker ne postulas honorarion, sed nur deziras gastigon. Certe ni povas trovi multajn samideanojn kiuj aranĝos gastigon, ĉu ne? Ankaŭ ni bezonas iun bonan Esperantiston kiu povos fari la korespondadon por ŝi. Ni aranĝu komitaton, jes? Kion vi povas fari? *Informu nin.*

MARK STARR KAJ JAPANA ESPERANTISTARO

Mark Starr, Eduka Direktoro de la Internacia Unio de Laboristoj de Virinaj Vestoj, vizitis Japanlandon laŭ invito de la Plejsupra Komando de la Alianca Armeo. Jen estas letero kaj novaĵo pere de S-ro Starr.

Estimata S-ano Mark Starr:

Ni, reprezentantoj de la Esperanto-Movado en Osaka, kore salutas vin. Ni estas fieraj, ke ni havas tiel eminentan samideanon inter ni kiel vin.

Dum la milito la Esperanto-Movado estis subpremata kiel esence pacema kaj kontraŭ-milita movado. Dank' al la malvenko de japana imperiismo, nia movado reviviĝis kune kun aliaj demokratiaj movadoj. De nun la Esperanto-Movado devos ludi grandan rolon por la demokratigo de Japanlando.

Por vere demokratigi Japanlandon ankaŭ la laborista movado havas grandan signifon. Ni opinias, ke Esperanto estas bona kaj efika ilo por eduki la japanan popolon, unuavice la laboristaron, en la spirito de internaciismo kaj demokratismo. Precipe la rolo de Esperanto en la internacia korespondado estos granda, ni opinias. Ni sopire atendas la tagon kiam ni povos korespondadi kun eksterlandaj amikoj en Esperanto. Ni estas pretaj ĉiam servi al la afero de internacia solidareco per Esperanto. Ni estos tre dankemaj se vi viaflanke akcelos la aferon por la bono de internacia paco.

Vivu Esperanto! Vivu Internacia Demokratismo! Je la nomo de la Esperantistaro en Osaka,

(*subskribis*) T. NIŠIOKA, K. IKEGAWA, N. KAWASAKI

"*Esperanto tre utilas*", diris Mark Starr. "Mi bone aplikis Esperanton en Japanlando. Mi vizitis la Esperanto-Instituton. En Tokyo, Kyoto, Osaka, Fukuoko, Iizeuka, mi renkontis Esperantistojn, kaj mi ja tre ĝojis havi rektan kontakton kun la popolo pere de Esperanto, kiu venkis la lingvo-baron. En mia raporto al Generalo MacArthur, mi proponis, ke konsultantoj devus havi kiel unu kvalifikaĵon, konon de la japana aŭ la Esperanta lingvoj por helpi ilin esti efikaj."

La 33-a Japana Esperanto-Kongreso okazis en la 23-a de Junio, en Tokio-Imperia Universitato kun 85 delegitoj, krome 45 studentoj kiuj aŭskultis paroladojn donitajn, nome "Scienco kaj Internacia Lingvo" de D-ro H. Oka, kaj "Kiel Rigardas Artefaritan Lingvon Unu Lingvisto" de S-ro H. Kobayasi.

Osaka-Gestudentoj Deziras Korespondi kun amerikaj gestudentoj, angle kaj Esperante. Adresu al la peranto: Prof. Kiyoshi Ikegawa, Kitagawati-Koori, Osaka, Japanlando.

La Japana Esperanto-Movado estis gvidata de Japana Esperanto-Instituto, sed ĉar ĝia rigora neŭtraleco estas iom neoportuna por disvolvi vigan movadon en la nova epoko, la 32-a Kongreso decidis fondi novan asocion, kiu paralele kun JEI laboros por akiri pli vastan popolamason al nia entrepreno.

Esperanto Per Radio N.H.K. (Japana Brodkasta Korporacio) disaŭdigis en sia tutlanda "horeto por respondoj al la aŭskultantoj" paroladon de Ŝ. Mi-jake, Generala Sekretario de JEI, *Pri Esperanto*. La parolado varbis pli ol 100 novajn samideanojn.

Japanaj Esperantistoj Atendas Korespondojn. Al Japanoj ankoraŭ ne estas permesite libere korespondi kun eksterlandanoj, sed atendante baldaŭan permeson japanaj samideanoj estas pretaj korespondi amase. Tiuj kiuj volas korespondi kun japanaj samideanoj skribu al la adreso de JEI tuj, kaj kiam ni ricevas permeson ni tuj respondos. Adreso: *Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati, Tokio.*

EANA HONOR ROLL

This 1946 Honor Roll lists members who for the most part have contributed for years as Patron and Sustaining Members. And many new members have joined as Sustainers. We owe a great debt of gratitude to each and every one. They make it possible for us to "carry on" despite many difficulties.

Life Members

Dr. Lydia Allen DeVilbiss
Ernest G. Dodge
Robert Karlson

Joseph Leahy
A. S. Mellichamp
Donald E. Parrish

Dr. Ivy Kellerman Reed
Dr. Cecil Stockard

Patron Members

William G. Adams
Mrs. Angela Alfaro
Clement Ayres
Dr. Luella K. Beecher
Boston Esp. Society
Dr. Ferdinand Breth
Prof. Edwin L. Clarke
John F. Clewe
Catherine Louise Coss
Ernest G. Dodge
Capt. Wm. M. Doran
Espo-Klubo Los Angeles

Esp. Society of Detroit
Esp. Society of New York
Dr. G. P. Ferree
Jas. H. Furay
Dan Ward Gibson
Hirsh Ginn
Wm. H. Gix
Hans B. Julow
William A. Knox
Howard E. Latham
Fred H. McMann
Fritz Mitschke

Joseph H. Murray
Victor Murray
W. B. Patzer
Charles Ramsay
Bernhard Selzer
Edwin Sievers
Charles Simon
H. Sloan
Dr. W. Solzbacher
Prof. Frank Tomich
Geo. B. Wrenn
Mrs. Flora Wyman

Sustaining Members

Robert Alberg
Dr. A. P. Anthony
Mrs. Helene G. Argo
H. R. Arnold
Mrs. Jewell Bainbridge
Edward Banks Balis
Arthur C. Ballard
J. Everett Barton
Robert Blackstone
Myron A. Bondelid
John M. Brewer
Chas. H. Briggs
Dr. A. A. Brill
A. M. Brya
Sellers N. Bunch
Woodbury E. Burd
Wm. C. Chapin
J. Leo Chapman
Edward Collins
Affonso H. S. Correa
Dr. F. G. Cottrell
S. C. Crook
Mabelle L. Davis
Preston Davis, Jr.
Robert L. Davis
Alfred D. Dennison
Armin F. Doneis
Mary Harlow Doneis
Paul Doubek
Harold R. Dreyer
Robert Eadie
David M. Earl
David Ericson
Elwood R. Etter

Mrs. F. W. Fay
Frank Gaines
Thomas A. Goldman
Frank X. Graser
Mrs. A. F. Hamann
Homer R. Hansen
Edward B. Higgins
George Hirsch
Yitkon Ho
Carroll A. Holbrook
W. F. Holeka
Rev. Daniel Hughes
Maurice Jagoda
Dr. Alfred E. Johns
Peter M. Kaitis
Curtis R. Karlson
Mrs. Robert Karlson
Dr. I. L. Kinney
Mrs. Laura Kinsey
Stuart Kittredge
Frank J. Kovarik
Eugene T. Lake
Russell R. Lambert
Granville B. Leeke
How C. Limb
Frances L. McDowell
Lt. R. C. Marble
Dr. J. M. Martinez
Wiley O. May
W. T. Myers
Rev. Canon Oliver
S. T. Pai
Elwyn C. Pollock
S. C. Pyfer

James C. Ragle
Grace Randolph
Catherine Raymond
A. E. Regal
Leo Saari
Ing. Esteban Salinas
Frank J. Schmidt
Mrs. W. C. Schulze
Dr. A. M. Schwager
Jessie Scott
John D. Shea
Gunnar Spant
Salvatore Spinella
Francis H. Sumner
Iver Svarstad
Prof. Joseph Tamborra
Herbert L. Thompson
John Tomishin
Nicholas Torzs
Arcade Trudeau
May D. Van Sloun
William Vathis
John Vidack
Maximiano Villareal
Mrs. Lee M. Wainman
E. L. Wells, Jr.
Victor Welman
C. W. Whipple
William T. Williams
Dr. Chas. R. Witt
Helene Wolff-Kleve
John W. Wood
Mrs. Sanford N. Young

LA ESPERANTO-STUDANTO

Here are some expressions that may prove useful in a restaurant where *oni parolas Esperante*. Notice especially the use of the suffix *-aj-* to give the names of the meat foods. Notice the Esperanto word for our American *crackers*. And remember, don't ask for a *ĉeko* in the restaurant—it's really a *kalkulo* (calculation), although you may need a *bankĉeko* to pay for it!

En la Restoracio

Kelnerino: Bonan tagon, sinjoro. Estas bela tago hodiaŭ, ĉu ne? Bonvole sidiĝu ĉi tie . . . kaj jen la menuo.

S-ro Diksen: Bonan tagon, fraŭlino. Jes, estas tre agrabla tago . . . Dankon, mi ja estas tre malsata. Kio estas bona hodiaŭ?

La fiŝo estas tre bona hodiaŭ.

Mi ne ŝatas fiŝon.

Do, eble vi dezirus ostrojn . . . aŭ ŝafidaĵon.

Mi ne ŝatas ostrojn . . . aŭ ŝafidaĵon . . . aŭ bovidaĵon . . . aŭ ŝinkon . . .

Do, eble vi preferas bifstekon!

Mi ne ŝat . . . H-m-m . . . Kion vi diris? Bifstekon? . . . Tre bone! Grandan bongustan bifstekon!

Kaj kiajn legomojn, sinjoro?

Ĉu legomoj gravas? Ne, nur bifstekon . . . Sed, se vi insistas . . . do, mi manĝos iom da terpomoj, pizoj, faboj, karotoj, maizo, salato . . .

Pardonu, sinjoro, vi rajtas elekti nur du legomojn.

Ĉu jes? Do . . . la du unuaj sufiĉas.

Ĉu vi deziras kafon kun la manĝo?

Ne . . . poste . . . Mi preferas kafon kun la deserto. Mi elektos glaciaĵon kun granda peco de ĉokolada kuko.

Tre bone, sinjoro, dankon.

(*Li sidas dum iom da tempo kaj atendas . . . prenas noŭlibron el la poŝo kaj subite ekkrias . . . alvokas la kelnerinon.*) Ho, fraŭlino, mi tre bedaŭras, sed . . . sed . . . mi ĵus memoras. La kuracisto insistas ke mi komencu dieton hodiaŭ! Ho, ve . . . laŭ lia instrukcio mi nur povas havi klaran buljonon kun biskvitoj. Ho, kompatinda mi . . . Alportu la supon . . . kaj poste la kalkulon. Mi estas nur sklavo de la kapricoj de mia kuracisto!

In the Restaurant

Waitress: Good day, sir. It's a lovely day today, isn't it? Please sit down here . . . and here is the menu.

Mr Diksen: Good day, Miss. Yes, it is a very pleasant day . . . Thank you, I am very hungry indeed. What is good today?

The fish is very good today.

I do not like fish.

Then, perhaps, you would like oysters . . . or lamb.

I do not like oysters . . . or lamb . . . or veal . . . or ham . . .

So, perhaps you prefer beefsteak!

I do not li . . . H-m-m . . . What did you say? Beefsteak? . . . Very well! A big delicious beefsteak!

And what kind of vegetables, sir?

Do vegetables matter? No, only beefsteak . . . But, if you insist . . . well, I will eat some potatoes, peas, beans, carrots, corn, salad . . .

Pardon, sir, you may select only two vegetables.

Is that right? Then . . . the two first ones will do.

Do you wish coffee with your meal?

No . . . later . . . I prefer coffee with the dessert. I will have ice-cream with a big piece of chocolate cake.

Very well, sir, thank you.

(*He sits awhile and waits . . . takes a notebook out of his pocket and suddenly cries out . . . calls the waitress.*) Oh, Miss, I am very sorry, but . . . but . . . I just remember. The doctor insists that I begin a diet today! Oh, woe . . . according to his instructions I may have only clear bouillon with crackers. Oh, poor me . . . Bring the soup . . . and afterwards the check. I am only a slave of the caprices of my doctor!

KANADA KRONIKO

Novajo de Kanado, plejparte devenas de la Kunredakisto por Kanado, *Kapitano Wm. M. Doran*. Ni petas ĉiujn samideanojn en Kanado, sendu la novaĵon amase al Kapitano Doran por legado en *Amerika Esperantisto*.

S-ro Hugo Gerisch, Picton, Ontario, estas Esperanto-pioniro. Li fondis, 1911, Esperanto-Grupon en Auerbach, Saksujo, kaj poste la "Vogtlandische Esperanto-Vereinigung" en Vogtlando. Li korespondas kun 100 samideanoj tra la tuta mondo. Lia edzino, lia filino Hilde en Danujo, kaj la edzo kaj du filoj, Leif 17 kaj Per 16, ankaŭ korespondas Esperante.

La Kanada Kunredaktisto havas multajn nomojn de alilandaj samideanoj kiuj skribis petante korespondantojn en Kanado. Se oni volus korespondi alilanden skribu al: *Wm. M. Doran*, 595 Pall Mall St., London, Ont.

S-ro R. Redhead, Victoria, B. C., havas 75 jarojn, sed li faras ĉion eblan por Esperanto. Pere de la Kanada Fakto li sendis gravan presadon de Viscount Cecil el Anglujo, kio estas tre favora al Esperanto. Ni esperas presiginti poste, se spaco permesus tion. Ni dankas al S-ro Redhead.

Esperanto-Grupo de Vancouver raportas pri ĉiusemajnaj kunvenoj kaj Esperanto-kursoj. Ĉiujare, D-ro P. L. Pratley de Montrealo, faras paraladon antaŭ la grupo kiam li trapasas la urbon. Nova spertulo en Vancouver estas D-ro F. J. Belinfante, konata Esperantisto de Nederlando kiu nun instruas en la Universitato.

S-ro W. D. B. Hackett, Sekretario-Kasisto de Toronto Esperanto-Klubo, skribas ke la klubanoj regule kunvenas en la YMCA en Toronto. Nova Esperanto-kurso komenciĝis antaŭnelonge, pere de helpo de tre bona artikolo en *World Affairs* (Mondaj Aferoj), eldonita en Toronto por lerneĵ-studentoj. Tiu grava artikolo donis la adreson de Toronto Esperanto-Klubo, kaj multaj leteroj demandante pri Esperanto venis de ĉiuj partoj de Kanado. Prezidanto Kaellble kaj Sekretario Hackett faris ĉion eblan por rikolti la intereson pri Esperanto en Kanado.

Profesoro F. J. Belinfante, en la Universitato de British Columbia, esperas helpi aranĝi Esperanto-kurson en tiu grava universitato komence la sekvontan aŭtunon. Ni anticipas grandan progreson en Vancouver.

ESPERANTO EXAMINATIONS OFFERED BY EANA

The Esperanto Association of North America conducts three grades of Examination in Esperanto, for which Certificates are awarded. Any Esperantist may take these Examinations upon payment of the \$1.00 fee for each application: *Atesto pri Lernado*, *Atesto pri Kapableco kun Rajto de Instruado*, and *Atesto pri Sperteco*. (The previous *Atesto pri Instruado* was discontinued.) You may receive full details about these exams by writing to the Central Office.

The following members have recently received Certificates: *Atesto pri Lernado* — *J. Everett Barton*, Kearny, N. J., *Glenn P. Turner*, Madison, Wis., *Tony Nabby*, Milwaukee, *F. L. Broening*, Baltimore.; *Atesto pri Kapableco* — (Kun Honoro) *Elwin Reed*, Los Angeles, (Kun Rajto de Instruado) *Rev. R. Edis Fairbairn*, Windemere, Can., *Arthur S. Kane*, Glendale, Cal.; *Atesto pri Instruado* — *Chas. Chomette*, Los Angeles, *Elwin Reed*, Los Angeles, *J. M. Clifford*, Corvallis, Ore.

Offer for Sale: *Postcard mailed from Warsaw in 1913, handwritten and signed by Dr. L. L. Zamenhof. Address offers, pertaining to postcard only, to: Box 34, American Esperantist, 114 West 16th Street, New York 11, N. Y.*

LA MALVIRTA TROIGO

GEORGE S. RAYMOND

Oni diras ke estas io en la aero ĉe la okcidenta bordo de la rivero Hudson, kie mi loĝas, kiu faras homon troigema. Eble la diro estas prava. Mi estas tre feliĉa por povi diri ke tio, kio ajn ĝi eble estas, certe min jam ne influis, sed mi havas amikon, unu Sinjoro Ĝonz, pri kiu mi ne povas diri same.

Tiu loĝas ĉe Meleagro-Valeto, tri kvar mejlojn malproksime de mia hejmo, kaj li estas tiel troigema ke kelkfoje mi hontas pri li. Iafoje mi eĉ opinias, ke li ne intencas diri la veron. Neniu devas tiel agi, kaj tian konduton mi forte kontraŭstaras.

Ekzemple, ĵus hieraŭ li rakontis al mi pri la densaj nebuletoj kiuj okazas ĉe sia hejmo dum la aŭtuno. Li diris ke ili jam estis tre densaj. Mi ĝentile konsentis. Li daŭrigis la temon, vidante ke mi estas kompleza kaj aŭskultas.

Ŝajne ĉiuj nebuloj de Londono jam estis hela vetero kompare kun tiu, kiu troviĝis ĉe Meleagro-Valeto, proksimume antaŭ du semajnoj. En ĝin li jam

foriris de la domo--diris Sinjoro Ĝonz--por nutri la bestaron en la ĉevalejo, kiu staris malantaŭ la domo, sur malgranda monteto. La nebuleto estis tiel densa ke li apenaŭ povis spiri kaj tute ne povis vidi, kaj la vojeto ŝajnis al li pli kruta ol kutime, sed neŝanceliĝe li marŝadis.

Subite la nebuleto komencis dissolviĝi. Tuj li trovis sin alte sur la rando de grandega amaso de ĝi, kaj ĝi ruliĝis for de sub li facilmove. Rapide, kun rimarkinda vigleco, li malsuprenglitis la nebuletan deklivon, kaj bonŝance alteriĝis precize sur la tegmenton de la ĉevalejo. Poste venis lia edzino, alportante ŝtupetaron al li, alie li jam ankoraŭ restus tie.

Malsprita rakonto, ĉu ne? Ne tre komika. Nur stulta mensogo. Kaj li kredeble sciis ke mi ne kredus ĝin; pro tio ke mi jam multfoje vizitadis tiun valetan en la daŭro de la plej malbonaj nebuletoj, kaj neniam mi mem povis suprenmarŝi sur nebuletan deklivon pli alte ol du, tri futojn super la tero.

EXCELLENT TEXTBOOK AT LOWEST PRICES

The *Reed Grammar*, by Dr. Ivy Kellerman Reed, is one of the best texts available for English speaking peoples. It is admirably suited for both individual and class study. It contains 142 pages (more than twice the size of Home Student), with very complete examples of all grammatical elements.

The *Reed Grammar* was printed to sell at 75c, but the photo-process printing is slightly blurred on a few pages through the book. Because the book is slightly less than the best quality printing, we are offering it at unheard of bargain prices. You will be doing yourself, your students, and your EANA Committee, a real service by

ordering this text as your standard Grammar.

Bertha Helmer, teacher of Esperanto, Fargo, N. D., writes: "Mi ŝatas la *Reed-Gramatikon* tre multe, kaj la studentoj ŝatas ilin ankaŭ. La enhavo estas tre bona, kvankam la presado estas iom malbona. Sed ni bone komprenas ĝin—kio estas plejmulte grava."

Put them to work at making Esperantists, at every opportunity. All *postpaid* from *American Esperantist*:

★

1	<i>Reed Grammar</i>	reduced to \$.50
5	" "	45c each	2.25
10	" "	40c "	4.00
20	" "	35c "	7.00
100	" "	32c "	32.00

ESPERANTO-KRONIKO

Ejoj de la EANA Kongreso, 1946 — F. A. Post, Little Rock, Ark, samideane memorigas nin pri la sekvantaj okazintaĵoj je la Kongreso, pri kiuj ni ne raportis en la oficiala raporto: 1) Kunsido de la Amerika Esperanto-Akademio okazis la lastan tagon. La ĉeestantaj membroj de AEA esprimis altan respekton al la memoro de sia kolego, D-ro Wm. Benson, kiu mortis antaŭ kelkaj monatoj. Oni pritraktis pri pureco de lingvo en oficialaj eldonaĵoj, ankaŭ pri lernolibroj instrumentoj, kaj atestoj de la Asocio. 2) Dum oficiala kunsido de la Kongreso, estis aprobita la jena rezolucio: "Aprobi la eldonon de dua plibonigita libro, "Kiu estas Kiu inter Nord-Amerikaj Esperantistoj", sub la redaktado de Akademiano F. A. Post; kaj urĝi al Usonaj kaj Kanadaj samideanoj partopreni en la eldono aperiota." Ni petas ke ĉiuj sendu informon aŭ demandon al: F. A. Post, R. F. D. 5, Box 606, Little Rock, Arkansas.

David Richardson (Daĉjo), Seattle, Wash., anoncas ke li fianĉiĝis kun F-ino Myra Jo Durham de la sama urbo. La geedziĝo okazos dum la venonta somero aŭ aŭtuno. Ni gratulas ilin. (Kompreneble la fianĉino estas jam bona Esperantistino!) Ankaŭ de Seattle ni ricevis kelkajn belajn ilustritajn poŝtkartojn, kiujn Daĉjo presis por la Societo Esperantista de Seattle — kun vere bela bildo de Monto Rainier. Ĉu tiu paradiza loko estos destinata por via mielluno, Daĉjo?

Chas. F. Weller, Fondinto-Prezidanto de "World Fellowship" (Mondo Frataro), kaj lia edzino, ne nur aliĝis al EANA, sed ili faras tre bonan reklamon pri nia Asocio en sia leterkapo. S-ro Weller skribis: "Estas la unua fojo ke ni reklamas pri kunlaboranta organizo". Ni dankas — kaj ni anticipas revidon ĉe la EANA Kongreso 1947, kiu denove okazos en Conway je la komenco de Julio.

Joy Postle kaj Robert Blackstone, Box 217, Orlovista, Florida, estas veraj Esperantistoj kaj veraj artistoj, kiuj pentras kolorplenajn birdojn, verkas poemojn pri la naturo, paroladas antaŭ organizoj kaj kluboj pri "Ravaj Birdoj de la Amerikoj", kaj eldonas ĉarmajn librojn pri la birdoj. Nova libro, *Kiel Pentri Kolorplenajn Birdojn* (How to Paint Glamour Birds) eldoniĝos angle en la somero 1947. Se vi ne ankoraŭ konatiĝas pri la bela arto de *Postle kaj Blackstone*, sendu leteron tuj al la adreso supre, petante informon — kaj ne forgesu sendi unu dolaron por havigi al vi *DU* belajn librojn de bildoj kaj poemoj pri "Ravaj Birdoj". Estas ja granda plezuro konatiĝi kun tiuj artistaj Esperantistoj.

Julia May Leach, Lilio Fuller, G. Winthrop Lee, Effie Meriam, Joseph Leahy, kaj Flora Benson, kontribuis librojn kaj Esperantaĵojn al la Centra Oficejo dum la pasintaj monatoj. Kelkaj aliaj ankaŭ tiamaniere helpis. Ni deziras poste plitaŭge danki ilin ĉiuj, sed kaptas momenton nun por mencii la vere tre helpemajn donacojn.

Mutual Aid Food Package Service (Komunhelpa Servo pri Nutraj-Pakaĵoj) Room 323, 80 East 11 St., New York, N. Y., estas koopera servo por helpi al tiuj kiuj sendas helpon eksterlande. S-ro Charles Solin, Esperantisto kaj membro de EANA, informas nin kaj rekomendas ke oni petu informon de tiu organizo. Ĝi estas kooperativa servo. kiu postulas nur 50c por pakado kaj prizorgado. Petu plenan informon. Vidu la adreson supre.

"World—an international newspaper" (Mondo—internacia ĵurnalo), 1236 11th St., N. W., Washington 1, D. C., presis preskaŭ tutpaĝan artikolon pri internacia lingvo kaj *Esperanto*, kun paragrafo en Esperanto, je la unua numero de tiu ĵurnalo, 1 Marto 1947 (Vol. 1, No. 1). Estis bone verkite.

ESPERANTO-KRONIKO

La 32-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Bern, Svislando, de la 26-a de Julio al la 2-a de Aŭgusto 1947. Membroj kaj abonantoj, kiuj deziras partopreni kaj ankoraŭ ne ricevis aliĝilon, postulu ĝin de la Centra Oficejo en New York. La kongreskotizo plialtiĝas je la 1-a de Aprilo. La adreso de la Loka Kongresa Komitato estas: Bundesgasse 20, Bern. Ni esperas, ke sufiĉe multaj membroj de EANA povos partopreni la unuan postmilitan Universalan Kongreson. Ni ricevis diversajn demandojn pri ebla organizo de Kongresa Karavano el Usono. Bedaŭrinde vojaĝ- kaj hotelmalfacilaĵoj estas ankoraŭ tro grandaj por fari tion en 1947. Ni esperas, ke en 1948, kiam la Universala Kongreso okazos en Svedujo, usona karavano povos esti organizata.

Dramo el Reala Vivo—La Grekulino, estas titolo de vera rakonto pri bezono kaj sufero. *William A. Knox* dediĉis sin al helpo por F-ino Paka en Grekujo, kompatinda viktimo de la milito. Kun la celo inviti aliajn partopreni kune kun li en tiu nobla klopodo, S-ro Knox verkis interesan artikolon el la leteroj de la Grekulino. La tuta rakonto estis presita en la bulteno, *Monda Bonvol-Servo*, 1 aprilo 1947, angle kaj Esperante en paralelaj kolonoj en kvar paĝoj. S-ro Knox tre volonte sendos ekzempleron al ĉiu kiu skribos al li. Petu ekzempleron ĉe: *William A. Knox, Circle Pines, Cloverdale, Michigan*.

Arta Vidaĵlibro de Tut-Malajo. Grandeco 9 x 11 coloroj, pli ol 40 famaj kaj modernaj, belartaj bildoj, Esperante kaj angle klarigitaj, bele bindita. Ankaŭ *Kompleta Serio de Japanaj Bank-Notoj en Malajo*, 1c ĝis \$1000, tute novaj. Ambaŭ kostas entute, por Amerikanoj, \$2.00. Havebla ĉe: *S-ino T. F. Liang, Hou Chio Public School, North Bridge Road 897, Singapore, British Malaja*.

Literatura Mondo, la altnivela revuo el Budapeŝto, Hungarujo, denove aperas. La unua numero de la Tria Periodo estas grandformata 36-paĝa kajero enhavanta originalajn artikolojn, studojn kaj poemojn kaj tradukojn el la hungara, usona, ukraina, ĉina kaj provenca literaturoj. El la usona literaturo enestas "La donaco de la magoj" de O. Henry, tradukita de Saĉio Oka (kiu konsilis D-ro Lehman Wendell) kaj "La sonoriloj" (The Bells) de Edgar Allan Poe, tradukita de Kolomano Kalocsay. Ni multe admiris aliajn tradukojn kaj originalajn verkojn de Kalocsay, sed ne tiel multe ŝatis lian tradukon de "La sonoriloj". Kion pensas fakuloj inter niaj legantoj? — *Literatura Mondo*, sendube unu el la plej legindaj revuoj en la Esperanto-movado, estas abonebla pere de *Amerika Esperantisto*. Ĝi kostas \$2.50 por unu jaro. Ni akceptas ankaŭ mendojn por la libroj eldonitaj de *Literatura Mondo* kaj rekomendas speciale la "Enciklopedion de Esperanto" (\$12.00 por 2 volumoj), la "Svisan Antologion" (\$5.35), kaj la "Ĉekoslovakan Antologion" (\$5.35). Ĉiuj binditaj, kaj afrankite.

En la Universitato de Iowa, Esperanto estas en prov-ekzamenoj. D-ro G. D. Stoddard kompilis ilin, por testi la kapablecon de studentoj en modernaj lingvoj. Oni devas legi Esperantofrazojn kaj traduki la signifon angle.

Literatura Klubo Stelo-Libro meritas atenton. Petu prospekton de AE.

Bela libreto en du koloroj: Perlojn el prelegoj kaj leteroj de nia majstro entenas **Pensoj de Zamenhof** elekto de homaranaj pensoj. Tradukita en 4 lingvojn kune kun la originala Esperanto. Bela presigo, bona aspekto. Mendebla ĉe la eldonanto, *Svisa Esperanto-Societo, Romanshorn, Svislando*, prezo 4 internaciaj respondkuponoj; aŭ ĉe *American Esperantist*, prezo 35c por unu, \$1.50 por kvin ekz.

ESPERANTO-KRONIKO

Pastro D-ro J. B. Se-Tsien Kao, OFM., la eminenta ĉina Esperantisto kaj kunredaktoro de "Amerika Esperantisto", jam skribis kelkfoje el Norda Ĉinujo, kien li reiris el Usono en la pasinta somero. Li nun loĝas en la urbo Paoki, en la Provinco Ŝensi. Depost Decembro 1946 li estas direktoro de la ĉiutaga ĵurnalo "I-ŝe-pao" en Sianfu, ĉefurbo de la Provinco. En Sianfu estas kelkaj Esperantistoj, kun kiuj Pastro Kao intencas starigi Esperanto-Asocion. Oni ankaŭ petis lian kunlaboron el Tientsin. Sur la usona truptransportsipo "General Breckenridge", en kiu Pastro Kao vojaĝis de San Francisko al Shanghai, li faris paroladon pri Esperanto, kaj multaj kunvojaĝantoj decidis lerni la lingvon. En Fengsiang, kie Pastro Kao vivis unue kiel Ĝenerala Vikario de la Katolika Eparkio, li klopodis enkonduki Esperanton en lernejojn kaj instruistajn institutojn. La estroj estas simpatiaj al Esperanto.

Fannie A. Baker, Troy, Pa., havas 85 jarojn, kaj estas fervora Esperantistino depost la jaro 1910. Ŝi sendis tre interesan leteron al ni, pri sia sperto rilate al Esperanto en Troy. — *Frank Schmidt*, Abbottsford, Wisc., havas 82 jarojn. Li kuraĝigas nin pro sia lojaleco kaj sinteno al Esperanto depost 1895. S-ro Schmidt lernis Esperanton en Bohemio.

Elmira Esperanto-Klubo, Elmira, Nov-Jorko, presas tre interesan "gazon" sur poŝtkarton. Jam du numeroj elvenis el la presileto de E. B. Billings, Jr. — *Esperanto News*, Somero 1946 kaj Marto 1947. Tiuj etaj poŝtkartgazetoj spegulas diversajn klopodojn de la klubo.

Woodbury E. Burd raportas pri la *Esperanto Klubo de Portsmouth*, N. H., kiu havas 16 anojn. Tiu klubo per la gvidado de S-ro Burd kaj helpo de F-ino Orloff sendube progresos konstante.

Roan U. Orloff meritas preskaŭ tutan eldonon de AE por sufiĉe priskribi la multajn klopodojn por Esperanto faritaj de ŝi. Kursoj, novaj membroj por EANA, paroladoj, radio, ktp.

XI Brazilia Kongreso de Esperanto, okazos en Sao Paulo, 13-21 Septembro 1947. Niaj brazilaj samideanoj invitas nin partopreni kiel membroj. La Brazilaj Kongresoj ĉiam faras grandajn, eĉ spektaklajn, servojn al Esperanto en Tut-Ameriko. Sendu vian kotizon, 30 kruzeroj aŭ \$1.65, al la *Brazilia Ligo Esperantista*, Praca da Republica, 54 sob., Rio de Janeiro, aŭ al *Amerika Esperantisto* por ĝin transsendi. Kiel en antaŭj jaroj, membroj ricevos valorajn kongres-esperantaĵojn.

EFFIE J. MERIAM, unu el la plej konataj kaj amataj pioniroj de la usona Esperanto-movado, mortis je la 22-a de Marto, 1947. *F-ino Meriam* estis plej lojala kaj kiel eble plej aktiva por Esperanto ĝis la fino. Nia kara koleĝino suferis paralizan atakon vespere je la 21-a de Marto, kaj mortis la sekvontan tagon. Ŝi havis 84 jarojn. Ŝi esperantistiĝis kune kun multaj altrangaj samideanoj en 1906, kaj ŝi ĉiam fieris pri tio ke la Bostona Esperanto-Societo, starigita en 1905, estas la plej malnova societo en Ameriko. Ne havinte oficon en EANA, post ŝia servo en fruaj tagoj kiel Ĝenerala Sekretario, ŝi tamen ludis helpan rolon kiel ĉionfarulino en kongresoj, kluboj, kaj propagando-klopodoj. Ŝia adreso, 486 Boylston Strato, en la koro de Bostono, estis la regiona centro por informo pri Esperanto. Ŝi ja pli bone scipovis pri aferoj Esperantaj ol multaj oficialaj samideanoj en Ameriko. La anoj de la Bostono-Societo havas la devon alte teni la verdan standardon, kaj sekvi la vojon kiun F-ino Meriam ĉiam kuraĝe indikis, — por akordi kun la vortoj de la profeto: "kiel viaj tagoj, tiel ankaŭ estos via forto." — *Nekrologo pere de G. Winthrop Lee*.

DON'T FORGET HUNGRY EUROPE!

Our readers know from the daily press and the radio how desperate the need for additional food and clothing is in a number of overseas countries. Esperanto organizations in Denmark, Switzerland, Argentina etc. have been doing a great deal to supply relief; Esperantists in the United States and Canada should not let anyone surpass them in generosity and zeal. Please re-read the "Appeal for Help" in the previous issue of AE (p. 110). Here are some additional addresses of Esperantists who need — and deserve — the help which your special effort can give them:

Names and Addresses

S-ro Franz Bischof, Blindengasse 28/3/20, Wien VIII/65, Austria; a leading Esperantist and anti-Nazi for many years.

S-ro Rudolf Arpad Huber, Kompassgasse 5/I, Steyr, Austria.

F-ino Elena PiuZZi, Mure S. Lucia 12, Vicenza, Italy.

S-ro Arturo Martellotta, Esperanta Komerca Asocio, Grottaferrata (Roma), Italy (would like to receive CARE packages and pay full value in Italian, Vatican, or San Marino stamps).

D-ro Job Kreutzer, Karl Stielerstrasse 4, Frankfurt/Main 1, Germany, American zone; author of Book Series "Esperanto ein Kulturfaktor", was persecuted by Nazis, lost 2 sons and house in war, was wounded in air raid, in great danger unless extra food can be secured.

F-ino Maria Schoettl, Schulstrasse 26/1, Muenchen 19, Germany, American Zone; an extremely deserving Esperantist.

S-ro J. F. Berger, Ehrenbergstrasse 1, (22c) Koeln-Riehl, Germany, British zone; translated into Esperanto Remarque's *The Way Back*, always strongly anti-Nazi; was, and is now again, President of Rhineland-Westphalia Esperanto Federation.

DEZERTO MOHAVEO

Malproksime, malproksime
la montoj portas neĝĉapelojn,
kaj sub la altaj, blankaj kapoj
kreskas la riĉega verdaĵo —
malproksime, malproksime.

Jen ĉi tie, jes ĉi tie
estas silenta, seka spaco;
nur kaktaj en dezerto vasta,
nur salvioj, nur blanka sablo
jen ĉi tie, jes ĉi tie.

Blua ĉielo kaj flavaj floroj
estas insignoj de l' dezerto,
kaj sin etendas al landlimo
de mondo neŝanĝanta! —
blua ĉielo kaj flavaj floroj.

Neŝanĝanta? ĝi ŝanĝas ĉiam;
stranga, fremda, senarba lando —
solaj Jesuarboj tordiĝas ĉie
torturitaj per suninkvizicio —
neŝanĝanta? ĝi ŝanĝas ĉiam!

— Gilbert Tuck, Kalifornio

KUNIRU, GEFRATOJ!

Kuniru, gefratoj el vasta la mondo
kantante komunan kantadon denove!
Disrompu, frakasu la murojn de tempo
kun planoj, kun pensoj, kun fido
kaj amo!

Ruĝiĝas la tago de nova homaro
plenplena de suno kaj varmo por ĉiuj.

Interne la prezon ni pagas,
la prezo d'antikva malamo.
Terure la homoj suferas.
Neniu forprenas la punon.
Sango ekfluas el vundoj
kruele faritaj antaŭe.

Sed tamen la tago ruĝiĝas, gefratoj!
El nigra mallumo de praa la nokto
ekbrilos denove esperon ĉielan.
Saneco, racio returnos al mondo.
Kuniru, gefratoj, tenante la manojn,
kantante komunan kantadon denove!

— Martin S. Allwood, Svedlando

DEZIRAS KORESPONDI

Kosto de anonceto: Eksterlande, 2 int. resp. kuponoj; Enlande, 5 cendoj por unu vorto.

Argentino. F-ino Margarita Sola, Estacion Quequen. Juna f-ino, interŝ il. pk. kun interesaj lokoj.

Argentino. F-ino Ofelia Balsategui, Paunero 344, Necochea. Juna f-ino, interŝ. il. pk. speciale kun Kalifornio kaj Grandlagaj lokoj.

Belgujo. Follaets Robert, Lieven Gevaertstr. 18, Oude-God, Antwerpen. 25-j fraŭlo dez. kor. kun Usonaj Esp-istoj pri ĉiuj temoj.

Bulgario. Kapitano Manolov, Dragan Cankov 9, Sliven. Bulgaraj Oficiroj dez. kor. kun kolegoj el tuta Ameriko. Ankaŭ filino 18-j., filoj 16-j. kaj 13-j., dez. kor. kun Usonaj junuloj.

Ĉekoslovakio. S-ino M. Jakubcova, Potacelova 70, Brno 15. Dez. kor. kun Usonaj samideanoj.

Ĉekoslovakio. Prof. Jan Filip. Jaroŝovska 127, Jiĉin. Serĉas korespondantojn Katolikajn por siaj gestudentoj kaj geskoltoj.

Franĉujo. Joseph Pion, 95 Bd. Henri-Barbusse, Val Notre-Dame, Sartrouville (S & O.) dez. kor. pri iu ajn temo.

Franĉujo. F-ino Marie Therese Valleit, 27 Bd. Trudaine, Clermont-Ferrand (P. de Dome). 26-j oficistino dez. kor. kun Usonanoj.

Germanujo. Willy Balduf, Lerchenstr. 23, Kornwestheim (14a), Stuttgart, US Zono. Pentrista majstro dez. kor., ĉiuj temoj. Resp. certa.

Germanujo. Ernst George, Nachtigal Pl. 28, Berlin 65. Seruristo dez. kor.

Germanujo. Ernst Diedrich, (3) Warin i Mecklenburg, Muhlendamstr. 42, (Rusa Zono). Gvidas Esp-okurson. Dez. kor. por la gemembroj, junuloj, instruistoj, farmistoj.

Hungario. Abonyi Arpad, Mezobereeny, Kozseghaza. Ŝtatoficisto dez. kor.

Nederlando. P. Ruis, Zuiderstr. 104, Delft. Transport-laboristo dez. kor.

Jugoslavio. F-ino Vanda Povhe, Gallusovo nabrezja 11, Ljubljana. Dez. kor.

Meksiko. Esteban Salinas E., Granada 36, Mexico, D. F. Civila inĝeniero, 25-j dez. kor. tutmonde kaj interŝ. pk.

Nederlando. J. Verstrael, Vermeerstr. 156, Den Haag. 23-j. dez. kor. kun ĉiuj landoj.

Peruo. Luis G. Fabrega, Apartado 2214, Lima. Dez. kor. kaj interŝ. pm.

Portugaliao. Americo Esteves de Almeida, Rua 4 de Agosto 12, Lisboa. 38-j mekaniktornisto dez. kor. prefere kun iu kiu scias pri mekanikaj aferoj.

Urugvajo. Bela Benko, Asuncion 1454, Montevideo. 21-j studento dez. kor. kaj interŝ. il. pk.

Usono. Elmira Esperanto-Klubo, 401 West First St., Elmira, N. Y. Dez. ricevi de Esperantistoj en Usono kaj tutmonde il. pk. Rekompense ni sendos il. pk. esperantlingvan pri la studo de Mark Twain.

Maroko. Emile Barone, 1 rue de l'Eglise, Casablanca. Dez. kor. kun usonaj ĵurnalistoj.

Franĉujo. Tri junaj francoj dez. kor., interŝ. PM, il.pk. (1) Rene Mery, (2) Bernard Torterat, (3) Felix Margueritat, Ĉefa Poŝtovic., Service Depart., Bourges—R.P., Cher.

Hungario. S-ino Ylonjo Illes, Bankbau-ul. 7.III.2, Budapest XI. Serĉas korespondantojn por si kaj la du filoj, 16 kaj 13 jaraj.

Usono. Robert Alberg, 21 Bedford St., Lynn, Mass. Dez. korespondantojn por sia grupo de geknaboj 13-15 jaraj.

Usono. Doris T. Connor, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y. Serĉas il. pk. el diversaj landoj por sia grupo de gejunuloj 12-16 jaraj.

Nederlando. W. Derks, Leenherenstr. 24, Tilburg. 23-j fraŭlo, universitata dez. kor. per il. pk. kun ĉiuj landoj.

ESPERANTO BOOKS

The Central Office is now equipped to supply all your book needs. When you buy books from "American Esperantist" all profits are used to give you a better magazine and a better E.A.N.A.. Place all your book orders through "American Esperantist."

ESPERANTO HOME STUDENT, James Robbie. Beginner's text for class or self-instruction. 64 pp., newly printed 14th edition.....	.25c
PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, Dr. Ivy Kellerman-Reed. More complete beginner's text. 142 pp. (war-time edition), formerly .75c, now only	.50c
STEP BY STEP IN ESPERANTO, M. C. Butler. Excellent simple text with instruction and numerous exercises. 244 pp.Paper, .85c; Cloth,	\$1.25
A PRACTICAL COURSE IN ESPERANTO, Szilagyi. Illustrated text.....	.60c
ESPERANTO, G. Alan Connor & Doris T. Connor. (World Language Series, edited by Prof. Mario A. Pei). A practical introduction to Esperanto, and systematic phrase-book. 32 pp.65c
LANGUAGES FOR WAR AND PEACE, Mario A. Pei, Ph.D. Guide to languages of entire world, incl. <i>Esperanto</i> (see above). 663 pp. cloth	\$5.00
ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY, by Major-General Cox. A complete analysis of Esperanto grammar, with helpful lists and examples. .Cloth	\$2.00
ESPERANTO KEY (English). Esperanto in miniature. . . .10c; 3 for .20c; 10 for	.50c
EDINBURGH DICTIONARY, Eng-Esp and Esp-Eng, 288 pp, best concise dict...	\$1.00
AMERICAN POCKET DICTIONARY, Carl Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's pocket companion. 80 pp. (war-time edition)30c
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. 1942 edition. 490 pp. Cloth	\$3.50
ESPERANTISMO, I. Gomes Braga. Miscellaneous articles about Esperanto movement, in easy excellent Esperanto. Recommended for individual, class, or club reading practice. 32 pp.15c, 10 for \$1.00
TIPOJ KAJ ASPEKTOJ DE BRAZILIO, by the Brazilian Institute of Geography and Statistics. One of the most impressive books in Esperanto. 36 full-page illus., 151 pp., 7 x 10½ in., beautifully printed on deluxe paper. Bound in the following covers.....art paper \$2.00; flex. leatherette	\$3.00
ESPERANTO-SORTIMENTO: <i>Princo Vano'</i> , Putnam-Bates; <i>Blanche</i> , Payson; <i>Miserere kaj Thaiis</i> , Payson; <i>La Rozujo Ĉiumiljara</i> , Payson; <i>La Akrobato de Nia Sinjorino</i> . Payson, <i>La Mopso de la Onklo</i> . Good Esperanto reading at bargain prices to reduce stocks.....	.25c each; all 6 for \$1.00
SEP VANGOFRAPOJ, Karlo Aszlanyi. Most recent novel of the "Epoko Series". Translated from the Hungarian. 145 pp.75c
"LIFE OF ZAMENHOF" (English) \$1.25. "VIVO DE ZAMENHOF" (Esperanto)	\$1.25
LA FINO, by Count Bernadotte, world best-seller, popular edition, paper	\$1.00
LINGVAJ RESPONDOJ, Zamenhof. A standard commentary, deluxe paper....	.75c
JOHANO KAJ SILVIO, Betts. A first reading book in Esperanto.....	.30c
THE LANGUAGE PROBLEM, Its History and Solution, E. D. Durrant. Highly recommended, complete treatise, with index. 168 pp. Cloth	\$1.50
"LA ESPERO" & "LA VOJO." Two separate Esperanto songs, with words and music for piano	Both for .25c
INDIAN BEAD STARS. White background with green star in center.....	.75c
GREEN STAR. Metal, white edge, gold rim, fairly large, brooch or button....	.65c
ESPERANTO AT A GLANCE. Leaflets.....12 for .10c; 100 for .60c; 200 for	\$1.00

YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership, with "American Esperantist," \$2.00 per year. Sustaining Member, annually, \$5.00. Patron Member, annually, \$10.00. Life Member, one payment, \$100.00. All memberships include "American Esperantist." Your membership in one of the higher brackets will greatly aid in the promotion of Esperanto in North America. Send your membership dues to:

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA
114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

INTERNATIONAL ESPERANTO BOOK CLUB LITERATURA KLUBO STELO-LIBRO

This *Esperanto Book Club* venture, Swedish Esperanto Publishing Society, deserves the support of every Esperantist. Excellent authors and titles, highest quality printing and binding, provide books which are outstanding.

Every several months a new book comes from the presses. Those who *subscribe to five consecutive volumes*, receive them at club-rate low cost, averaging about \$1.75. You pay after you receive them. Send AE your promise to take *five consecutive books*. Here are the available titles already issued. You may begin with any available title, or with the forthcoming volume by Lajos Zilahy. Start as far back in the list as desired. (For those who wish to start with the large-print, bound edition of *LA FINO*, Vol. 1 of the series, we have just four copies for the first four *memberships* received, which specify beginning with Vol. 1. The bound edition is entirely out of print at the publishers. Price is now \$2.25. Also, all following titles, without membership, cost \$2.25.)

Vol. 2	<i>LA GRANDA AVENTURO</i> , Szilagy	<i>members</i>	\$1.75
Vol. 3	<i>MI SERĈIS ORON...</i> , Flood	<i>members</i>	1.60
Vol. 4	<i>VIVO VOKAS</i> , Engholm	<i>members</i>	1.75
Vol. 5	<i>PRINTEMPO DE MORTO</i> , Zilahy	(Fall 1947)	

This is your opportunity to receive excellent Esperanto books at low cost, and to support a very meritorious Esperanto venture. Send in your *membership* (promise to accept 5 consecutive volumes) *now*, to *American Esperantist*.

PLENA VORTARO DE ESPERANTO - 2nd ed.

Good news for a few readers of American Esperantist!
We have some 6 perfect copies of *PLENA VORTARO*!

When, by accident, we learned that we might be able to secure a few copies of this practically hidden treasure (for use by the staff of AE), we offered to pay *almost any price* for them. We were ready to pay \$10.00 each for a few copies. However, we arranged to do better than that; and those copies not needed, will go for \$6.75 per copy.

This is not the photo-offset of *PLENA VORTARO*, which is scheduled to be printed. *This is the original second edition*, strongly bound in green cloth, stamped in gold, perfectly printed on excellent paper. It is a *buy* at any price.